



2(186)
2022

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas:

ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,

Adreso por korespondi:

str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Anna Frajlich

tradukis Lidia Ligęza

Porozumienie

Wołamy się przez szklane ściany
tak blisko
widzę twoją twarz
wyciągam rękę – szklana ściana
mówimy dwoma językami
wszystko w porządku
tłumacza brak
a tak jest zdrowo naokoło
czyste powietrze
ostry mróz
ja widzę
że coś do mnie wołasz
wołasz przez ścianę
i ja ci pewnie odpowiadam
coś odczytujesz z moich ust
dwoma różnymi językami

może ten sam mówimy
ból.

Błędne koło w jednym miejscu tylko
przerwać można wystarczy i trzeba
a to miejsce małe
poszczególne
a ból wielki
wszechogarniający
a nazajutrz znów trzeba zaczynać
tamtą bitwę stoczoną wieczorem
a zwycięstwo drobne
pojedyncze
a zwątpienie
mierzy się w otchłaniach

Interkonsento

Ni vokas nin tra vitraj vandoj
tiel proksime
mi vidas vian vizaĝon
mi etendas la manon – vitra vando
ni parolas per du lingvoj
ĉio en ordo
tradukanto mankas
kaj tiel estas salubre ĉirkaŭe
pura aero
akra frostoj
mi vidas
ke vi ion al mi vokas
vokas tra vando
kaj mi al vi eble respondas
ion vi legas el mia buŝo
per du diversaj lingvoj

eble la saman ni parolas
doloron

Eraran cirkon en unu loko nur
interrompi oni povas sufiĉas kaj devas
kaj tiu loko malgranda
aparta
kaj doloro granda
ĉion ĉirkaŭpremanta
kaj morgaŭ denove oni devas komenci
tiun batalon donitan vespere
kaj venko eta
unuopa
kaj dubon
oni mezuras per abismoj

Ukrainio hodiaŭ kiel Pollando en 1863

Daŭra aktualeco!

Leganto de la regiona gazeto DNA (Les Dernières Nouvelles d'Alsace) interese kaj trafe informis la legantojn per la suba letero de la famkonata franca verkisto Victor HUGO „Alvoko al la rusa armeo en 1863*”.

Tiu leganto aldonis: Se oni anstataŭigas en tiu ĉi teksto la terminojn «Pollando, pola, Varsovio, Peterburgo, caro kaj XIX-a jarcento» per «Ukrainio, ukraina, Kievo, Moskvo, Putin kaj XXI-a jarcento», eblus peti de Victor HUGO, ke li ree sendu sian leteron al la rusa armeo! Konstatu mem!

„Rusaj soldatoj, reiĝu homoj. Ĉi gloro estas aktuale proponata al vi, ekkaptu ĝin. Dum tio ankoraŭ eblas, aŭskultu:

Se vi daŭrigas ĉi sovaĝan militon; se vi, oficiroj, kiuj havas noblajn korojn, sed kiujn kaprico povas malgradigi kaj ĵeti en Siberion; se vi soldatoj, hieraŭaj servutuloj, hodiaŭaj sklavo, perforte forŝiritaj de viaj patrinoj, de viaj fianĉinoj, de viaj familioj, regatoj subknutaj, malbone traktataj, malbone nutrataj, kondamnitaj dum longa tempo kaj por nedefinita daŭro al milita servado, pli severa en Rusio ol punlaboro alilande; se vi, kiuj estas viktimoj, vi vin engaĝas kontraŭ la viktimoj; se je la sankta momento, kiam la respektinda Pollando ekstaras, je la lastebla momento, kiam vi povas elekti inter Peterburgo, kie regas la tirano kaj Varsovio, kie regas la libereco; se en tiu decidiga konflikto, vi ignoras vian devon, vian unikan devon, la fratecon; se vi komune agas kontraŭ poloj kune kun la caro, t.e. ilia ekzekutisto kaj la via; se „subprematoj, vi de la subpremato lernis nur la subtenon de la subpremato; se vian malfeliĉon vi transformas al honto; se vi, kiuj tenas ĉemane la spadon, vi disponigas al la despotismo, peza kaj malforta monstro, kiu vin ĉiujn dispecigas, vi rusojn same kiel la polojn, vian forton blindan kaj dupan; se anstataŭ vin turni kaj alfronti la buĉiston de la nacioj, vi malbrave subpremeegas, per la supereco kaj la multnombreco de la armiloj, tiujn heroajn, malesperigitajn popolanojn postulantajn unuarangan rajton, la rajton al patrolando; se meze de la XIX-a jarcento, vi finmurdas Pollandon, se vi tion faras, sciu tion, viroj de la rusa armeo, (...) vi naskos la abomenon de la civilizita mondo! La krimoj de la perforto estas kaj restas krimoj; la publika hororo estas puno.

Rusaj soldatoj, serĉu inspiron ĉe la poloj, ne batalu kontraŭ ili. Tio, kion vi trovas antaŭ vi en Pollando, tio ne estas la malamiko, tio estas ekzemplo.

Victor HUGO, Hauteville-House, la 11-an de februaro 1863

* La pola insurekcio de 1863 kontraŭ la rusa imperio estis ribelo por la sendependeco de Pollando en la tiam pola teritorio, kiun tiam okupis Rusio.

esperantigis *Bardhyl Selimi*

La januara ribelo estis la lasta nacia ribelo kontraŭ Rusa Imperio. Ĝi komenciĝis 22-an de januaro de la jaro 1863. La ribelo estis proklamita per manifestaĵo de Provizora Nacia Registaro en Varsovio kaj en Litovio la 1-an de februaro de la sama jaro. Ĝi ampleksis terenojn de Pola Regno, Litovio, Blankrusio kaj parton de Ukrainio. La ribelo daŭris ĉefe en partizana formo. Partoprenis en ĝi ĉiuj soci-klasoj (ĉefe nobelaro), sume preskaŭ 200 miloj da ribelantoj, kiuj partoprenis en ĉirkaŭ 1200 bataloj. Pereis kelkdeko da miloj de batalantoj, multaj troviĝis en malliberejoj kaj 40 miloj da personoj oni kondamnis je restado en Siberio. La ribelo finiĝis aŭtune en 1864 j.

Redakcio de AB

Kwaidan. Rakontoj nekutimaj.

Pri spegulo kaj sonorilo

Antaŭ ok jarcentoj sacerdotoj el Mugenyama en distrikto Tatomi intencis fondi sonorilon por sia templo, petis do virinojn de sia paroĥejo, por ili apogu ilian intencon kaj oferu por fandi malnovajn spegulojn el bronzo.

En tiu tempo en Mugenyama vivis juna, edziniĝinta vilaĝanino, kiu ankaŭ oferis sian spegulon por la sonorilo, sed tuj tion ekbedaŭris. Ŝi rememorigis al si, kion pri tiu spegulo rakontis ŝia patrino, kaj tion, ke ŝi apartenis ankaŭ al la avino kaj al la praavino, kaj ke ŝi estis plena de feliĉaj rememoroj kaj ridetoj, kiuj en ŝi respeguliĝis.

Ŝi estis tre malfeliĉa, ŝajnis al ŝi, ke senpense rezignis de parto de la vivo. Ŝi pensis pri malnova diraĵo, ke spegulo estas Animo de Virino, (sur multaj bronzaĵoj videbliĝas hieroglifo signifanta animon), ŝi maltrankviliĝis kaj sentis, ke estas mistere kunligita kun la spegulo. Sed tamen ŝi ne kuraĝis interparoli kun iu ajn pri sia ĉagreno.

Kiam ĉiuj kolektitaj speguloj oni komencis fandi – unu el ili ne volis fandiĝi. Malgraŭ penoj ŝi rezistiĝis kontraŭ ĉiuj streboj. Evidente virino, kiu donacis ĝin al la templo devis pri tiu ago bedaŭri. Ŝi ne oferis ĝin tutkore, kaj ŝia memama animo daŭre al la spegulo ligita tenis ĝin dura kaj malvarma en la eno de la brulanta forno.

La famo pri tio disvastiĝis larĝe kaj baldaŭ ĉiu jam sciis, al kiu apartenis spegulo, kiu ne volis fandiĝi. La povra donacantino ne volante plu senti grandan honton – droniĝis. Ŝi postrestis tamen la adiaŭan leteron enhavantan ĉi tiujn vortojn: "Kiam mi mortos fandado de la spegulo jam eblos. Sed tiu, kiu batante en ĉi sonorilon detruos ĝin – estos de mia spirito pridonacita per la granda riĉo."

Kiam la sonorilo jam estis preta granda amaso da homoj venis en la templon, por en ĝin bati. Ili batis en ĝin uzante ĉiujn fortojn, sed la sonorilo okazis tre solida. Neglektante protestojn de la sacerdotoj homoj furioze batis en ĝin tago post tago kaj horo post horo. La bruoj estis tia, ke sacerdotoj ne povantaj jam ĝin elteni ruljetis la sonorilon el la monteto en profundan marĉon, kiu ensorbis ĝin poreterne. Tia estis fino de ĉi tiu Sonorilo Mugen – restis nur la legendo.

Kiam la sonorilo estis jam en la marĉo malaperis ŝanco por ĝin disbati. Sed homoj kredis, ke agante laŭ la propra imago – t.e. imagante, ke diversaj objektoj estas ĉi tiu sonorilo – disbatadis ilin atendantante promesitajn riĉaĵojn.

Virino je nomo Umegae kaj ŝia parenco samurajo Kajiwara foje vojaĝis komune kaj ek troviĝis en gravaj financaj klopodoj. La virino rememorigis al si pri Sonorilo Mugen, prenis bronzan pladon kaj imagante, ke ŝi estas tiu sonorilo bategis en ĝin ĝis ĝia krevo. En ĉi tiu ĝuste momento ŝi ekvokis pri tricent oraj moneroj. La gasto, kiu ankaŭ estis en tiu ĉardo, kiam ekkonis kaŭzon de la bruoj kaj la tutan historion – ravita donacis al Umegae tricent ryo el oro.

Post ĉi tiu okazintaĵo Sonorilo Mugen fariĝis tre fama kaj multaj homoj imitis Umegae ankaŭ serĉante la feliĉon. Unu el ili estis malĉasta vilaĝano, kiu loĝis sur bordo de Oigawa proksime de Mugenyama. Perdinte la havaĵon pro diboĉoj li formis en ĝardeno modelon de sonorilo el koto kaj detruis ĝin postulante laŭte grandan riĉon.

Tiam elkreskis antaŭ li figuro de la virino kun malligitaj haroj, vestitan en blankon, tenantan en la manoj la kovritan potegon. Ŝi diris: "Mi venis por rekompenci vian ardan preĝon tiel, kiel ĝi tion meritas. Akceptu ĉi tiun potegon." Enmaniginte ĝin al la vilaĝano ŝi malaperis, kaj li, feliĉa, alkuris rapide hejmen, por komuniki al la edzino bonan sciigon. Li starigis antaŭ ŝi la potegon, kiu estis vere peza kaj ili ambaŭ komune ĝin apertis. Okazis tiam, ke ĝi ĝis la randoj plenigita estis... Sed ne! Vere mi ne povas diri al vi per kio ĝi estis plenigita...

tradukis Lidia Ligeza

Sabateto aŭ festo de Kupaĵa

Sabateto estas ĝenerala ankoraŭ hodiaŭ sur granda tereno de Pollando nomo de ceremonio aŭ ceremonioj celebrataj dum la somera ekvinokso 23-an de junio, do dum vigilio de tago de la sankta Johano Baptisto. Alia nomo de tiu rito estas festo de Kupaĵa, kio ligiĝas kun tago de tiu sanktulo, dum kiu okazadis baptojn per tuta enmergiĝo aŭ bano en akvo (vortoj kupaĵa, kupaĵo signifas banon). Oni tiam bruligis fajrojn kaj ludis ĉe ilia brilo. Kaj nomo kaj tereno de tiu kutimo ŝanĝiĝadis dum jarcentoj.

Memkompreneble pastraro kondamnis ĝin prave montrante ĝian paganan devenon. Marteno de Urzędów en XV-a jarc. skribis: "Oldulinoj kaj junulinoj nokte fajrojn bruligis, kantis, dancis, al diablo honoron kaj preĝon donante; de tiu kutimo pagana ĝis nun en Pollando ili ne volas rezigni." Eklezio sukcesis elimini ĉi ceremonion sur terenoj de okcidenta Pollando. Tie, kie oni ne povis entute ĝin ekstremi, ĝi ricevis kristanan karakteron. Sukcese oni ligis ĝin kun patrono de akvoj, sanktulo, kiu baptis Kriston en Jordano – sankta Johano Baptisto. En sabatetaj ritoj oni ligis du diversajn kultojn de antaŭkristana tempo – kulton de fajro kaj kulton de akvo. Ĵetado de florkronoj sur akvon, nun komprenata kiel omeno de edzeco primare havis alian sencon. Temis pri favoro de akvo kaj kuracaj ecoj de trempitaj en ĝi herboj.

Fajrojn sabatetajn oni bruligis sur kampoj kaj herbejoj, sed antaŭ ĉio sur montetoj kaj montopintoj. Ĉirkaŭ ŝtiparo oni dancis kaj okulfrape gimnastikis, saltis unuope aŭ pare trans flamojn. Al dancoj virinaj akompanis korusaj kantoj. Pri tio mencias Jan Kochanowski en "Kanto sanktjohana pri sabateto" fidele verkante pri detaloj de la malnova rito kaj substrekante rolon de artemizio – herbo per kiu la dancistinoj sin zonis. Artemizio estis la plej magia herbo sabateta, simile kiel verbeno ĉe aliaj popoloj. Krom artemizio multe signifis hiperiko defendanta kontraŭ demonoj kaj filiko, kiu floras nur dum nokto de sankta Johano kaj al trovanto povas montri trezorojn, kiuj ĝuste en tiu nokto eliras el la tero por sekigi. Multaj fabeloj rakontas pri tio, sed la plej ofte kun malsukcesa fino. Trovanto perdas la filikfloron pro malatento.

Fajroj kaj herboj sekurigis kontraŭ malfeliĉoj. Oni kredis, ke tie, kien ĝisiris fumo el sabateta fajro al kampoj ne damaĝos hajloj. Per cindro el ĉi tiu fajro oni surŝutadis plugteron por certigi fekundon kaj trans cindro post estingita jam fajro bone estis transpeli brutaron kontraŭ malsanoj kaj febloj.

Dancoj kaj kantoj sabatetaj havis karakteron aŭguran-magian. Juna paro, kiu sukcesis kun plektitaj manoj transsalti fajron, estis certa rapidan nupton. Knabinoj kantis kantaĵojn, al kiuj aldondis nomojn de gejunuloj plaĉantaj al ili reciproke. Ĝi estis magio svata. Okazis ankaŭ kantoj komikaj, en kiuj oni svatis personojn, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne taŭgis por edziĝi.

Ekvinoksa nokto, la plej kurta en tuta jaro estis pasia festo de amo. Je tiu etoso apogis Ŝekspiro sian eminentan dramon "Somermoznoka sonĝo". Oni povas supozi, ke antaŭ ĉio tiu etoso kaj emo al fizika amo malhelpis al pastraro toleri ritojn de tiu unika nokto.

Pri fabeloj apogitaj je sabatetaj kredoj oni jam menciis. Certaj estas vere belaj kaj instruigaj.

Polaj popolaj kantoj malofte aludas al la sabatetaj ceremonioj. Folkloristoj opinias, ke ili ofte konsistas el mekanike pritrakitaj partetoj el primara enhavo, do ke la rezulto ne estas valora.

Kontraŭe, ke temas pri proverboj. Adalberg grupigis sub signalvorto "Sankta Johano" proverbojn, kiuj povas plaĉi. Ekz.:

- Morgaŭ Johan' akvon baptos, jam damaĝo vin ne kaptos.
- Sankta Joĉjo veni preta, sur akvon florkronon ĵetu.
- Kie sabateta fajro, ne malhelpos al vi hajlo.

Pola literaturo respeguligas kredojn kaj ritojn de sabateto. Eminentaj ekzemploj estas tutcerte Jan Kochanowski, romantikaj poetoj kiel Seweryn Goszczyński, poste Wincenty Pol kaj Józef Ignacy Kraszewski, kiu en "Malnova fabelo" postrestis la plej konatan priskribon de sabateta nokto. Tiuj aŭtoraj priskriboj prezentas ne nur artimon, sed ankaŭ fidelecon al folkloro.